DIA REGNO

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (949) • 2021 •

## Ni kongresis !!

Post longa hezito pro la pandemia situacio kaj decido je lasta momento, tamen okazis kongreso en Legnica, Pollando, en bona ekumena etoso. Raporto en sekvonta numero.

La bildoj de supre maldekstre: episkopo W. Pytel, pastro K. Noculak
meza vico: G. Szubryczyńska, Á. Ráczkevy-Eötvös
suba/antaŭa vico: T. Pomorska, O. Fischer



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| La kristanoj, loĝantoj de la planedo Tero | 75 |
| "Estas Finite" | 81 |
| Sophia Magdalena Scholl | 83 |
| 9a Reta Diservo – Pentekosta prediko | 84 |
| La familia altaro | 88 |
| La strato de dolaro – "Dollar Street" | 91 |
| Informetoj – De kie venas kvadrataj fiŝoj? | 92 |
| Retaj diservoj kaj Bibliaj tagoj en Esperanto – ĝisdatiga listo | 93 |
| Esperant', Ernesto, estas via ĝojo | 94 |
| Pri Somere gajiĝas la vasta land' kaj Pli ol kvindek | 95 |
| Somere gajiĝas la vasta land' | 96 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, daŭre ni vivas sub la influo de la pandemio, kiu pli malpli estas parto de nia ĉiu-taga vivo. Malfacile vidi la finon, ĉar denove venas informo pri fortiĝo kaj kreskanta nombro da kontaĝitaj homoj.

Eble ni estis bonŝancaj, ke ni tamen povis kongresi dum sufiĉe trankvila somero. Ni dankas Teresa Pomorska kaj ŝiajn kunlaborantojn por la bona kongreso, kie ni ekkonis multajn novajn sed certe longdaŭrajn geamikojn. Mi planas, ke en la sekvonta numero de Dia Regno, mi publikigos kongresan raporton kun multaj bildoj kaj ankaŭ prelegojn prezentatajn dum la kongreso.

Sekvontjare ni kongresos en suda Hungario kaj espereble ni revidos plurajn geamikojn, kiuj ĉi-jare ne povis partopreni. Sekvu informon en Dia Regno.

Havu bonan legadon!

# La kristanoj, loĝantoj de la planedo Tero

## Enkonduka prelego en Legnica, 70a kongreso de KELI

Philippe Cousson, FR

Ĉu nia planedo freneziĝis ? Ĉu tio neniam okazis antaŭe ? Certe tio jam okazis, sed ne je tiu skalo.

Antaŭ kelkaj jaroj, la tiama franca prezidanto, Jacques Chirac [Ĵak Ŝirak], deklaris solene la jenon : "Nia domo brulas, kaj ni rigardas aliloken". Tio estis ĉe la plenkunsido de la 4-a Tera Pintkunveno la 2an de septembro 2002 en Johanesburgo, Sudafriko.

Tamen, ĉu multaj aferoj ŝanĝiĝis en la regado de la mondo fare de politikistoj kaj entreprenistoj ĝenerale ? Vi ĉiuj scias, ke bedaŭrinde ne, nur kelkaj decidoj kiuj estis nur ete aplikataj, kiel tiuj de la COP21. Jam de multaj jardekoj oni anoncas, ke la homoj transformas la planedon en malbonan direkton, tamen neniu aŭskultis tion. Eĉ troviĝas kelkaj kiuj diras, ke tio ne estas vera, malgraŭ la evidenteco.

Al la voĉo de la avertantaj sciencistoj aldoniĝis ankaŭ la voĉo de teologoj kaj religiaj respondeculoj, ekzemple la konciliecan proceson ekumenan "Paco, justeco kaj konservado de la kreitaro" en Bazelo 1989, aŭ antaŭnelonge la papa teksto "Laudato sí" (vidu en Dia Regno 1/2020 aŭ en Espero Katolika 4-6/2015 /red).

Nuntempe du aferoj ĉefe atingas nian planedon, nome la klimatŝanĝiĝo kaj ĝiaj konsekvencoj kaj la pandemio de kovimo. Sed tio ne estas ĉio. Poluado, de la trinkebla akvo, de la maro, de la aero, de la tero, detruo de la arbaroj, betonigo de la grundo, ktp.

De 1988 la Interregistara Panelo pri Klimata Ŝanĝiĝo (IPCC) avertas la homojn, la registarojn, pri la minacoj rilataj al la evoluo de la klimato kaj ĝiaj konsekvencoj. Oni aŭskultas ilin, foje konsentas parole, sed agoj, ŝanĝoj malofte okazas. Kaj la konsekvencojn ni havas nun antaŭ ni. La atmosfero plivarmiĝas. Ho, nur de kelkaj gradoj, sed tiuj gradoj sufiĉas por detrui la ekvilibron: modifo de la reĝimo de la ventoj, de la altatmosferaj ventegoj. Ie sur la planedo estas tre varma somero, dum en la sama duono de la Tero estas mal-



Philippe Cousson dum prelego

varmeta somero. Ie tie estas preskaŭ samtempe granda varmo kaj fajregoj, kaj pluvegoj kaj inundoj. La tropikaj regionoj konas pli da ŝtormoj, uraganoj, ciklonoj kaj tajfunoj. La polusaj kaj ĉirkaŭpolusaj regionoj suferas plivarmiĝon, la grundo degelas, la arbaro brulas, la glaciaj tavoloj, ĉu super maro ĉu super tero iom post iom malaperas. Plia konsekvenco : la nivelo de la maro plialtiĝas, kaj jam kelkaj insuletoj en la pacifika oceano estas preskaŭ superŝutitaj kaj iliaj loĝantoj devos baldaŭ translokiĝi al firma grundo.

Ne nur la arbaroj brulas, sed la homoj detruas ilin por gajni terenon por kultivi aŭ por serĉi ercojn. La konsekvenco estas kaj minaco pri malaperigo de bestaj specioj, kaj pli proksimigo de sovaĝaj bestoj al la homoj. Ni vivas tion jam de tre longe, sed pli forte nun, kun la konsekvencoj de tiu proksimigo. Atingis la homojn malsanoj, kiuj venas el bestoj jam de la neolitika tempo. Tamen la afero ampleksiĝis, ĝis niaj nunaj epidemioj kaj pandemioj, *Lhassa, Ebola, Sars* kaj nun kovimo. Alia problemo kun la malpligrandiĝo de la arbaro estas la kaptado de karbondioksido, kiun tiuj arbaroj apenaŭ sukcesas fari nun. La alia ĉefa kaptanto de karbondioksido estas la maro, sed ĝia kapablo malpliiĝis pro la poluado kaj ĝia varmiĝo.

La poluado de la tero kaj de la maro ne nur minacas la homojn, sed ĉefe la bestojn kaj la vivon mem. En la maroj ne nur vojaĝas kontinentoj de plastaĵoj, sed ankaŭ invadoj de algoj atingas diversajn marbordojn.



Arbaro post fajro.
Fotis Martin Olsson /Wikipedia, CC BY-SA 3.0

La klimato kulpas pri la inundoj, sed ankaŭ la homoj, kiam ili modifas la pejzaĝon, la riverojn, per la betonigo kaj malaltigo de trapenetrado de la grundo, per kanaligo de la riveroj, per sekigo de marĉoj kaj malaltaj kampoj.

La homoj per siaj industrioj, siaj veturiloj produktas multe pli da karbondioksido ol la tuta tera sistemo kapablas kapti. Ja, la homoj por vivi kaj labori bezonas akvon, sed ili uzas pli kaj pli da akvo por ekzemple bredi brutojn por manĝi viandon. Mi antaŭnelonge aŭdis, ke nune estas pli da bredataj bestoj ol da entute homoj kaj sovaĝaj mamuloj. Ankaŭ kelkaj kultivitaj plantoj same bezonas tiom da akvo, ke la akvotavoloj subteraj malgrandiĝas. Ne kalkulu kun la pluvegoj por plenigi ilin. Tiuj kuras sur la tero al la maro, sed ne kapablas eniri la grundon. Varmiĝo, trouzado, poluado, akvobaraĵoj, kaŭzas tension pri la hav-

eblo de la akvo, ĝis kaŭzi konfliktojn inter homoj, inter ŝtatoj, ekzemple laŭ la river-egoj Kolorado, Nilo, Eŭfrato, Parana. Tiu trouzado de akvo kaŭzis la malpleniĝon de la Arala maro aŭ de la Morta maro. La historiistoj antaŭvidas eblecon eĉ de militoj pro la aliro al la akvo.

La sciencistoj konstatas ankaŭ, ke ni troviĝas en la sesa amasa formorto de la vivantaj estaĵoj. La kvin unuaj okazis dum la geologiaj eraoj. Estas sur la planedo malpli kaj malpli da vivantaj estaĵoj, ĉu oni kalkulas la efektivan nombron, notinde insektojn kaj birdojn, aŭ ĉu oni kalkulas la nombron de specioj. Eĉ estas tre probable specioj, kiuj estos malaperintaj jam antaŭ ol oni malkovras kaj priskribas ilin vivaj.

Antaŭ proksime unu semajno estis la tago de preterpaso, tio estas la tago, kiam la homaro foruzis ĉion, kion produktas dum unu jaro la tuta planedo. Tiel iom post iom la homaro elĉerpas la terajn rimedojn. Efektive, estas urĝe ŝanĝi ion en la konduto de la homaro.

La homoj, dum sia historio kaj en siaj kulturoj havis diversajn rilatojn al la ĉirkaŭanta naturo.

Oni povas dividi en du grupojn : tiuj, kiuj klare distingas inter la homoj kaj la cetero, kaj tiuj, kiuj iamaniere identigas ilin.

Animismo atribuas identecon kaj personecon al ĉio, ĉu viva, besto, arbo, ĉu ne viva, roko, monto. Eĉ la tero havas tian karakteron, ĝi estas la tero-patrino, ĉu *Pacha-Mama*, ĉu *Gaïa*. Eĉ de kelka tempo, iu romantikismo atribuas plej altan valoron al “la vivo”. Panteismo, ĉu orienta, ĉu nuntempa esotera diras, ke ĉio estas parto de iu esto, Dio aŭ forto. Tiuj pensoj kondukas al atribuado de sankta karaktero al la tuta naturo kaj al ĝiaj elementoj.

| Jaro | Tago de preterpaso |
|---|---|
| 1987 | Oktobro 23 |
| 1990 | Oktobro 11 |
| 1995 | Oktobro 5 |
| 2000 | Septembro 23 |
| 2005 | Aŭgusto 26 |
| 2010 | Aŭgusto 8 |
| 2011 | Aŭgusto 4 |
| 2012 | Aŭgusto 4 |
| 2013 | Aŭgusto 3 |

| Jaro | Tago de preterpaso |
|---|---|
| 2014 | Aŭgusto 5 |
| 2015 | Aŭgusto 6 |
| 2016 | Aŭgusto 5 |
| 2017 | Aŭgusto 3 |
| 2018 | Aŭgusto 1 |
| 2019 | Julio 29 |
| 2020 | Aŭgusto 22 |
| 2021 | Julio 29 |
| 2022 | |

La tago de preterpaso estas la tago, kiam la homaro foruzis ĉion, kion produktas dum unu jaro la tuta planedo

Inverse, ateismo, kun sia korolario de senorigina mondo, povas konduki al foresto de respekto al la naturelementoj. Kompreneble, mi skemis.

La kristana, sekvante la judisman, kompreno de la naturo estas alia. La ĉefa kaj decida punkto estas la kreado.

Estas multaj mitoj pri la origino de la mondo. La Biblia rakonto estas alispeca. Kompreni ĝin tiel, ke ĝi efektive estiĝis en ses tagoj ne plu validas. Sed kompreni, ke la tutan universon kreis Dio, portas fortan signifon en la sinteno de kredanto: "Mi estas kreitaĵo, mi ne rajtas malestimi tion, kion Dio kreis."

Mi invitas vin rigardi poste al la kantiko de la kreado, kiu troviĝas en la libro Ijob (38 ĝis 42), kiam Dio konvinkas Ijobon pri sia grandeco kaj potenco, aŭ al la 8a Psalmo aŭ al la 104a.

Kelkaj vortoj miskomprenitaj misgvidis la agadon de tro multaj : Genezo 1:28, "ke la homo submetu la teron, kaj regu super la bestoj". Submeti kaj regi ne havas alian signifon ol administrado. La homo estas la administranto, ne la posedanto de la kreitaro. Regi, administri, ne estas ekspluati.

Tamen alvenis en la mondon iu sablero, iu granda sablero, nome la peko. Genezo 3:17 : la tero estas malbenita pro la homa sinteno. Tion konfirmas Jeremia 12:4 :

*"Kiel longe Vi tenos la landon en malĝojo kaj la herbo sur ĉiuj kampoj velkos? Brutoj kaj birdoj pereas pro la malboneco de ĝiaj loĝantoj, kiuj diras: Li ne scias, kio estos al ni."*

Aŭ Jesaja 24:4-6 :

*4 Funebras kaj velkas la lando, senfortiĝas kaj velkas la mondo, senfortiĝas la eminentuloj de la popolo de la lando. 5 Kaj la tero estas malpurigita de siaj loĝantoj; ĉar ili malobeis la instruon, ŝanĝis la leĝon, detruis la eternan interligon. 6 Pro tio malbeno konsumis la teron, kaj kulpiĝis tiuj, kiuj loĝas sur ĝi; pro tio forbrulis la loĝantoj de la lando kaj restis malmulte da homoj.*

Kaj eĉ tion konfirmas la epistolo al la Romanoj 8:19-22 :

*19 Ĉar la fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio. 20 Ĉar la kreitaro subiĝis sub la vanecon, ne volonte, sed, pro la subiganto, kun espero, 21 ke la kreitaro mem ankaŭ liberiĝos el la sklaveco de pereo en la liberecon de la gloro de la idoj de Dio. 22 Ĉar ni scias, ke la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras ĝis nun.*

Tamen, la Biblio estas plena de bildoj pri mondo renovigita. En Jesaja 11:6-9 :

*6 Kaj loĝos lupo kun ŝafido, kaj leopardo kuŝos kun kaprido; kaj bovido kaj leonido kaj grasigita bruto estos kune, kaj malgranda knabo ilin kondukos. 7 Kaj bovino paŝtiĝos kun urso, kaj iliaj idoj kuŝos kune; kaj leono simile al bovo manĝos pajlon. 8 Kaj suĉinfano ludos super la truo de aspido, kaj demamigita infano metos sian manon sur la neston de vipuro. 9 Oni ne malbonagos kaj ne difektos sur Mia tuta sankta monto, ĉar la tero estos tiel plena de konado de la Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron.*

Pensu ankaŭ pri la priskribo de la nova Tero en Apokalipso 21 kaj 22. Oni povas imagi al si tiujn ĉi idealajn mondojn. Ili estas figuro de la novaj tero kaj ĉielo kiuj konsistigos la regnon de Dio. Kio vere ĝi estos, estas neeldirebla, ne priskribebla.

Kvankam la Biblio parolas pri novaj tero kaj ĉielo, oni legas en ĝi plurfoje pri la amo, jes la amo de Dio por sia kreitaro. Eĉ franca teologo Jean-Paul Gabus verkis libron titolitan : *"La freneza amo de Dio por la kreitaro"*. Dio enplektiĝas en la kreitaro, en la vivo de nia mondo ĝis la nivelo, ke Kristo venis kaj mortis, ne nur por la homoj, ne nur por mi mem, sed ankaŭ por la repacigo de la tuta mondo.

> *La homoj, inkluzive de la kristanoj, ĉiam havas elekton. ... elektojn, kiuj havas konsekvencojn por la Tero, por la naturo.*

Kvankam la homo ricevis en tiu tuto specialan lokon, specialan rolon, li ne estas la centro de la mondo. Tamen, li ricevis mision, nome la administradon, li ricevis etikan respondecon, Kaj li fuŝis la tuton, laŭ sia nivelo kaj kapablo.

Aurélien Barrau [Oreljĩ Baro], franca astrofizikisto, skribis en sia libro *"La plej granda defio de la historio de la homaro: antaŭ la ekologia kaj sociala katastrofo"*, p. 91 :

Ni bezonas rakonton, historion kaj ikonografion de la ekologia revolucio. Ĝi devas esti deziro kaj ne malĝoja devigo. Se ĝi estas sentata kiel terapeŭtiko antaŭ la – tre reala – patologio, kiu trafas nian mondon, la batalo estas jam perdita.

Tiun rakonton, tiun historion, tiun ikonografion kapablas provizi la Biblio, kapablas provizi kristanismo, kiam ĝi restas fidela al sia alvoko. Kio do estas atendata flanke de la kristanoj ? Kio ĝenas kaj malhelpas tiun agadon ?

Unue, kompreneble miskompreno, surdeco de la kredantoj mem. Ankaŭ ilia malforteco, kiam ili submetiĝas al la nuntempaj leĝoj de la tempo kaj de la mono. Tiuj malsanoj estas la ĉefaj malamikoj de la medio, de la Tero. Mamono detruas la Teron, kaj ankaŭ la klimaton.

La homoj, inkluzive de la kristanoj, ĉiam havas elekton. Ili, unuope aŭ kolektive ĉiam faras elektojn, elektojn kiuj havas konsekvencojn por la Tero, por la naturo.

Mi trovis skeman resumon de la encikliko *"Laudato sí"*. Ĝi komenciĝas per laŭdo al Dio. Grave, esence, ĉu ne? Tamen ĉu la kristanoj sufiĉe laŭdas kaj dankas Dion pro tiu kreitaro en kiu ni troviĝas kaj vivas ? Pripensu tion. Poste, la papo parolas pri "nia komuna domo", preskaŭ la vortoj de Jacques Chirac. Efektive, nia planedo estas nia komuna domo, por ĉiuj, homoj, bestoj, kaj tiel plu. Ĝi ne estas nur nia homejo. Kaj ni komprenu ke ĉio ligiĝas, la sorto de la Tero, de la naturo aŭ pli ĝuste de la kreitaro, la sorto de la homoj entute kaj unuope, kaj nelaste la sorto de la malriĉuloj, la plej viktimaj. La papo kunigas la krion de la Tero kun la krio de la malriĉuloj. La agado de la kristanoj ne povas disigi ambaŭ batalojn.

La 87a paragrafo de la teksto de la Ekumena kunveno de Bazelo 1989 “Paco kun justeco” ligas tiujn du temojn kun la problemo de la konservado de la kreitaro. Ĉar eŭropa, tiu ĉi kunveno celis la eŭropanojn, sed la mesaĝo validas ankaŭ por la tuta homaro. Kio estis la akcepto de tiu teksto ĉe la Eklezioj kaj la regantoj de Eŭropo aŭ la mondo ? Tio estis malmulto.

Mi multe insistis pri la etika karaktero de la necesa rilato al la kreitaro, sed estas alia aspekto, kiun mi ne detalos, temas pri la estetika aspekto, nome vidi en la mondo, en la kreitaro, kio belas, serĉi kiel valorigi tiun belecon, kaj ĝui ĝin, por kristanoj kun danko kaj laŭdo al Dio, la kreinto. Tion bone faras kelkaj bibliaj psalmoj, kaj multaj artistoj, pentristoj, muzikistoj, ktp.

Por fini, mi volas lasi al vi tiun ĉi tekston, jam kelkajn jarojn aĝa, verkita de respondeculoj de diversaj religioj en Francio, katolikoj, protestantoj, ortodoksuloj, judoj, islamanoj kaj budhistoj.

Mi dankas.

---

## Deklaracio de la Konferenco de Religiaj Gvidantoj en Francio en 2015
## La klimata krizo estas spirita kaj morala defio

*Ni, membroj de la Konferenco de Religiaj Gvidantoj en Francio, kune prenas la parolon por dividi nian konvinkon: preter teknikaj, ekonomiaj kaj geopolitikaj problemoj, la klimata krizo estas spirita kaj morala defio.*

*Estas antaŭ ĉio nia rilato kun la kreo komprenata kiel donaco de Dio kaj al naturo, kiu estas en risko.*

*Ne plu vidante sian rilaton al la naturo kaj sian intiman interdependecon kun ĉio, kio ĝin konsistigas, la homaro devojiĝis en sintenon de regado kaj mortiga ekspluatado de la medio.*

*Ni estas defiitaj repripensi kaj alimaniere enloĝi nian rilaton kun la kreado kaj la naturo. Ni estas unu. Detruante la medion, la homaro sin detruas; konservante ĝin, ni konservas nin mem, ni konservas nian najbaron kaj estontajn generaciojn.*

*Nia spirita kaj morala konscienco estas alparolata.*

*Ni estas defiitaj agi por justeco, labori por paco, urĝe prepari sekuran kaj realigeblan estontecon por niaj infanoj, elirante el la epoko de poluantaj energioj kaj reviziante niajn ekonomiajn modelojn de produktado kaj konsumo sen limo.*

*Ni alvokas salton de konscio al konsekvenca klimata agado kaj pridemandado de niaj valoroj kaj de niaj sintenoj. Ni rifuzu indiferentecon kaj avidecon. Ni malfermu nin al kompato kaj frateco. Ni eliru el nia egoismo. Ni montru solidarecon kaj prenu la komunan bonon kiel nian kompason. Ni daŭrigu kaj valorigu ĉiun agon.*

# "Estas Finite"

## el "Desire of Ages" de Ellen G. White

Tradukis Vere Williams, AU

Kristo ne perdis Sian vivon ĝis Li estis plenuminta la laboron, kiun Li venis fari kaj kun Sia forlasanta spiro Li ekkriis, "Estas finite." Johano 19:30. La batalo estis gajnita. Lia dekstra mano kaj Lia sankta brako akiris por Li la venkon. Kiel Konkeranto Li plantis Sian standardon sur la eternaj altoj. Ĉu ne estis ĝojo inter la anĝeloj? Ĉiuj en la ĉielo triumfis en la venko de la Savanto. Satano estis venkita, kaj sciis, ke lia regno estis perdita.

.....

La ĉielo rigardis la Viktimon perfiditan en la manoj de la mortiga popolaĉo, kaj kun mokado kaj perforto rapidigita de unu tribunalo al alia. Ĝi aŭdis la rikanojn de Liaj persekutantoj pro Lia modesta naskiĝo. Ĝi aŭdis la malkonfeson kun malbenado kaj ĵuroj de unu el Liaj plej amataj disĉiploj. Ĝi vidis la furiozan laboron de Satano, kaj lia potenco super la koroj de homoj. Aj, timema sceno! la Savanto kaptita je noktomezo en Getsemano, trenita tien kaj reen de palaco al juĝa halo, aperigita dufoje antaŭ la pastroj, dufoje antaŭ la sinedrio, dufoje antaŭ Pilato, kaj unufoje antaŭ Herodo, mokita, skurĝita, kondamnita, kaj kondukita ekstere esti krucumita, portante la pezan ŝarĝon de la kruco, la veojn de la filinoj de Jerusalemo kaj la mokadon de la kanajlaro.



La ĉielo vidis kun funebro kaj mirego Kriston pendantan sur la kruco, sangon fluantan de Liaj vunditaj tempioj, kaj ŝviton miksitan kun sango staranta sur Lia frunto. De Liaj manoj kaj piedoj la sango falis, guto post guto, sur la rokon boritan por la piedo de la kruco. La vundoj faritaj de la najloj ekfaŭkis kiam la pezo de Lia korpo perforte trenis sur Liaj manoj. Lia malfacila spiro iĝis rapida kaj profunda, dum Lia animo anhelis sub la ŝarĝo de la pekoj de la mondo. Ĉiuj el la ĉielo estis plenaj de miro, kiam la preĝo de Kristo estis ofertita meze de Lia terura sufero,—"Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras." Luko 23:34. Kaj staris tie homoj, formitaj laŭ la bildo de Dio, unuigitaj por detrui la vivon de Lia ununura Filo. Kia vido por la ĉiela universo!

La regantoj kaj potencoj de mallumo estis kunvenintaj ĉirkaŭ la kruco, ĵetante la inferan ombron de nekredo en la korojn de homoj. Kiam la Sinjoro kreis ĉi tiujn estaĵojn por stari antaŭ Lia trono, ili estis belaj kaj gloraj. Ilia beleco kaj sankteco estis konformaj al ilia altigita stacio. Ili estis riĉigitaj kun la saĝo de Dio, kaj zonitaj kun la panoplio de la ĉielo. Ili estis servantoj de Jehovo. Sed kiu povus rekoni en la falintaj anĝeloj la glorajn kerubojn, kiuj iam servis en la ĉielaj kortegoj?

La periloj de Satano konfederaciis kun malbonegaj homoj kondukante la homojn al la kredo, ke Kristo estas la ĉefa pekulo, kaj farante el Li objekton de malamo. Tiuj, kiuj mokis Kriston dum Li pendis sur la kruco, estis plenigitaj kun la spirito de la unua granda ribelulo. Li plenigis ilin kun abomenaj kaj abomenindaj paroladoj. Li inspiris iliajn mokojn. Sed per ĉio ĉi li akiris nenion.

Se unu peko povus esti trovita en Kristo, se Li en iu detalo cedus al Satano por eskapi la teruran torturon, la malamiko de Dio kaj homoj triumfus. Kristo klinis Sian kapon kaj mortis, sed Li tenis firme Sian fidon kaj Sian submeton al Dio. "*Kaj mi aŭdis grandan voĉon en la ĉielo, dirantan: Nun fariĝis la savo kaj la potenco kaj la reĝeco de nia Dio, kaj la aŭtoritato de Lia Kristo; ĉar ĵetiĝis malsupren la akuzanto de niaj fratoj, kiu tage kaj nokte akuzas ilin antaŭ nia Dio.*" Apokalipso 12:10.

Satano vidis, ke lia masko estis ŝirita for. Lia administro estis malkaŝita antaŭ la nefalantaj anĝeloj kaj antaŭ la ĉiela universo. Li estis malkaŝinta sin kiel murdinto. Verŝante la sangon de la Filo de Dio, li estis elradikiginta sin de la simpatioj de la ĉielaj estuloj. De nun lia laboro estis limigita. Kian ajn sintenon li povus havii, li ne plu povus akompani la anĝelojn, dum ili iris al la ĉielaj kortegoj, kaj antaŭ ili akuzi la fratojn de Kristo estante vestitaj kun vestoj malpurigitaj de la peko. La fina ligo inter Satano kaj la ĉiela mondo estis rompita.

ↂ

Homoj rigardas Ellen G. White (1827-1915) kiel la plej vaste tradukita Usona aŭtoro. Ŝiaj verkoj estis eldonitaj en pli ol 160 lingvoj. Ŝi skribis pli ol 100 000 paĝojn sur tre diversaj spiritaj kaj praktikaj temoj. Ŝi suprenlevis Jesuon kaj la Sanktajn Skribojn kiel fundamento por la fido de homoj.

La Deziro de Aĝoj estas libro pri la vivo de Jesuo Kristo skribite de la Sepataga Adventisma pioniro Ellen G. White. Ĝi unue estis publikigita en 1898. Ĝi estas parto de ŝia kvinvoluma serio Konflikto de la aĝoj, religiema komentaĵo tra Biblia historio de Genezo ĝis la dua alveno de Kristo.

Origine Ellen G. White verkis la libron kun multe pli granda enhavo, sed antaŭ la eldono, la libro estis dividita en tri apartajn volumojn.

La titolo de la libro estas eltirita de malnova testamenta profetaĵo de Jesuo en Ĥagaj 2: 7. "Mi skuos ĉiujn popolojn; kaj venos io ĉarma por ĉiuj nacioj [KJV, angle: *the desire of all nations shall come*], kaj Mi plenigos ĉi tiun domon per gloro, diras la Eternulo Cebaot."

# Sophia Magdalena Scholl

## 100-jara datreveno de ŝia naskiĝo

Bazita sur Vikipedio, laŭ propono de Siegfried Krüger, DE


Sophia "Sophie" Magdalena Scholl (1921–1943) estis germana studentino, unu el 5 fondintoj de la senperforta kontraŭnazia grupo *Blanka rozo* [ge: Weiße Rose], kiun ŝi kun sia frato Hans Scholl esence gvidis.

Scholl naskiĝis la 9an de majo 1921 en Forchtenberg. La patro, Robert Scholl estis libera demokrata politikisto, kiu kritikis politikojn de Hitler dum la Nazia reĝimo. Sophia Scholl estis la kvara infano de Robert Scholl.

Scholl unue intencis agi en junulara movado de Nazia Germanio. En 1932 Scholl aliĝis en Unio de germanaj virgulinoj, la virina junulara organizaĵo de Nazia Germanio. Tamen, la arestoj de ŝiaj amikoj, kiuj partoprenis en Germana Junulara Movado, ŝangis ŝian politikan vidon kaj komprenon pri la naziismo.

En la somero de 1942, ŝi kun aliaj membroj, i.a. la frato Hans Scholl, Willi Graf kaj Kurt Huber, aperigis kontraŭnaziajn pamfletojn en Munkena kaj Hamburga universitatoj. En februaro 1943 Sophie kaj la frato estis arestitaj de Gestapo dum disvastigado de tiaj pamfletoj. Post kvar tagoj oni kondamnis la gefratojn kaj la amikon Christoph Probst je morto pro perfido kaj ekzekutis ilin per gilotino. Dum la proceso Sophie esprimis la jenajn vortojn:

"*Kion ni skribis, vi ankaŭ tiel opinias, vi simple ne havas la kuraĝon diri ĝin!*"



La laboro de Sophie kaj Hans Scholl en La Blanka Rozo estis forte influita de ilia kresko en liberala, kristana ŝtatoficista hejmo. Kristanaj humanismaj kaj pacismaj valoroj, kiuj formis la bazon de ilia laboro, estis formulitaj per leteroj kaj flugfolioj. Sophie ofte citis devizon de la franca katolika filozofo Jacques Maritain kiel la bazo de sia laboro: *"Il faut avoir l'esprit dur et le cœur tendre"* [oni devas havi malmolan menson kaj teneran koron].

La flugfolioj estis poste disdonitaj en pluraj germanaj urboj en milionoj da ekzempleroj fare de aliancanaj aviadiloj.

Laŭ la motivoj de la sorto de ŝi kaj de la grupo oni produktis plurajn filmojn.

Je la 60-jara datreveno, la spektantoj de la germana publika televidkanalo ZDF en enketo voĉdone lokigis ŝin kune kun ŝia frato sur la 4an lokon en listo de la plej grandaj personoj de la germana nacio.

# 9a Reta Diservo – Pentekosta prediko

23an de majo, 2021

Philippe Cousson, FR

*1 Kaj estos post tio ke Mi elverŝos Mian blovon sur ĉiun karnon; viaj filoj kaj viaj filinoj profetados, viaj maljunuloj sonĝos sonĝojn, viaj junuloj vidos viziojn.*
*2 kaj ankaŭ sur la (kampo-)sklavojn kaj sur la (dom-)sklavinojn Mi en tiuj tagoj elverŝos Mian blovon.*
*3 Kaj Mi donos mirindaĵojn en la ĉielo kaj sur la tero: sangon, fajron, kaj kolonojn da fumo.*
*4 La suno fariĝos malluma, kaj la luno fariĝos sanga, antaŭ la alveno de la granda kaj timiga tago de la Eternulo.*
*5 Kaj estos ke ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, eskapos; ĉar sur la monto Cion kaj en Jerusalem estos eskapo, kiel diris la Eternulo, kaj inter la fuĝintoj, kiujn la Eternulo vokas.*

Joel 3:1-5

Karaj gefratoj, laŭ la versioj, la numerado de la ĉapitroj de la libro de la profeto Joel varias. La Esperanta traduko de la Biblio sekvas la numeradon de la hebrea Biblio. Tiuj kvin versikloj konsistigas la 3an ĉapitron. La libro de Joel ne enhavas indikon, kiu povus certe indiki daton de la redaktado. Estas pluraj argumentoj por diversaj datoj. La dato nune preferata de la fakuloj estas post la ekzilo.

La lando ĵus suferis invadon de akridoj, kiuj preskaŭ ĉiujn rikoltojn detruis. Kaj poste venis seka periodo. Tiun katastrofon, Dio riproĉas al la gvidantoj de la popolo, ke ili misgvidis la popolon, misadministris la landon.

Post tiu konstato, la profeto petegas la gvidantojn kaj la popolon, ke ili konvertiĝu, ke ili turniĝu, ŝanĝiĝu, reiru al Dio.

Tiam li mencias la tagon de la Eternulo, la tagon de la Sinjoro, kiun li priskribas. Tiu tago estas tago de savo kaj tago de juĝo.

La temo de nia mallonga ĉapitro estas la promeso de savo preter tiu katastrofo.

Krom ke tiun tekston citas Petro en la Pentekosta tago en Jerusalemo, estas pluraj paraleloj kun nia nuna situacio en la mondo.

Nia naturo, nia planedo, estas malsana. Pro malbona prizorgado de la homoj ĝi iom post iom difektiĝas. Videblas kaj antaŭvideblas katastrofo – katastrofoj.

Unu el tiuj katastrofoj ĵus trafis la mondon, nome la pandemio de kovimo.

La homoj, detruante la mediojn de la bestoj, pliproksimigas sin al ili, kaj tiel favoras la transiron de malsanoj. Tio ne estas nova en la homa historio, sed la problemo fariĝas akra.

Alia paralelo troviĝas en la fakto ke tiu malsano vojaĝas per la blovo, disvastiĝas per la blovo, eniras la korpon tiel.

Dio promesas ĉi tie sian blovon al la homoj, blovon de savo, de vivo, kiam la nuna malsano disvastiĝas ankaŭ per la blovo – blovo tro ofte al morto.

Tria paralelo, la promeso estas por ĉiu, la promeso de la elverŝo de la blovo de Dio celas ĉiun. Same, tiu malsano per la blovo povas atingi ĉiun, junan aŭ maljunan, sklavon aŭ liberulon.

Krome, tiu ĉi malsano faras viktimojn kaj savitojn, eskapintojn. La tago de la Eternulo lasos savitojn, eskapintojn, restintojn.

La centra temo de la libro estas la tago de la Eternulo aŭ tago de la Sinjoro. Tiu temo trakuras tra la Biblio. Ĝi estas trovebla ekzemple ĉe du aliaj "etaj" profetoj, Amos kaj Cefanja, kaj ankaŭ en la apokalipsaj tekstoj de la Nova Testamento. Estas pluraj interpretoj de tiu temo. Ĉu la evento okazas nun, ĉu ĝi okazis dum la ĉeesto de Jesuo Kristo sur la Tero, inter la homoj aŭ ĉu ĝi koncernas la lastajn tagojn, la finon de la mondo kaj la finan juĝon. Mi komprenas, ke la tri signifoj validas. La tago de la Eternulo signifas kaj promeson kaj juĝon.

Ĝi estas la nuna tempo por ĉiu en sia propra vivo, en sia propra sperto, ĉiu ĉu nun vivas ĉu vivis en antaŭaj tempoj, ĉu por la postaj generacioj. La tago de la Eternulo por ĉiu estas la tago de la renkonto kun Dio, kaj en kristana kompreno estas la tago de la renkonto kun Kristo. Kiu renkontas Kriston renkontas Dion. Tiu tago estas kaj juĝo kaj savo, kaj konfeso kaj pardono.

La kosmaj mirindaĵoj manifestiĝis dum Kristo vivis, dum li mortis sur la kruco, dum li releviĝis el la mortintoj, dum li sendis la Spiriton, la blovon de Dio. Juĝo estis la kruco, savo estis la releviĝo. Juĝon kaj savon elmontris Jesuo dum sia vivo. Juĝo kune kun savo eblis samokaze nur ĉar en la amo.

Same, en la lastaj tempoj, venos kaj juĝo kaj savo. Ĉu la homoj vokos la nomon de la Eternulo aŭ ĉu ili serĉos lokon por kaŝiĝi ? Ĉu Dio juĝos aŭ ĉu la homo sin mem ? Inter promesoj kaj minacoj, la Biblio ne donas definitivan punkton, kaj tio estas kohera kun la justeco, la vereco, la amo de Dio kaj lia libereco. Neniu scias pli ol Dio mem, nek tiu, kiu diras ĉiu saviĝos, nek tiu, kiu diras, ke nur kelkaj.

Ĉu vi kredas, ke la veno de Jesuo Kristo estis tago de la Eternulo, kiam Dio venis por vivi kun la homoj, ke lia morto estis la kulmino de tiu tago ĉar la kulmino de la amo, ke la releviĝo estis la venko super la morto, ke la blovo de Dio estis verŝita sur la tiamaj kredantoj, kaj sekve kaj konsekvence sur la postaj, tiam vivu el tiu promeso, ke via tago estas ankaŭ la tago de la Eternulo, la tago de la promesoj, la tago de la savo, la fino de la ĉiama juĝo, de la ĉiama memkondamno?

Estas du partoj en tiu mallonga perikopo, duoble markitaj per "Kaj estos" kaj per "ĉiu".

*Kaj estos*, ke post tio, tio estas post la aferoj indikitaj en la du unuaj ĉapitroj, la Eternulo elverŝos sian blovon. Kaj tiu blovo estas potenca, vivpotenca. Simple memoru la valon de ostoj en la libro de la profeto Jeĥezkel. Sed ĉi-tie ne sur ostojn li elverŝas sian blovon, sed sur vivantojn, sur membrojn de sia popolo, kaj sekve kaj konsekvence ankaŭ sur nin. Kaj Joel precizigas, sur *ĉiun*, junulo kaj maljunulo, kaj ankaŭ sur sklavon kaj serviston, sur ĉiu karno. Kaj aŭskultu, la junuloj profetados, kaj la maljunuloj sonĝos sonĝojn.

Kutime, ni diras, ke la junuloj sonĝas pri estonteco, sed ĉi tie ili proklamas la vortojn de la Eternulo, ili profetadas, kaj la maljunuloj sonĝas. Ni ne forgesu, ke Moseo deklaris al tiuj, kiuj volis malhelpi Eldadon kaj Medadon profetadi, ke li preferus, ke la tuta popolo profetadu. Dufoje, Joel diras ke la Eternulo, la Sinjoro, elverŝos sian spiriton. Tio estas


Joel laŭ Mikaelanĝelo en Siksta Kapelo / Vikipedio

por li certa kaj trankviliga konvinko. Kaj kiam li elverŝos sian spiriton, li donos mirindaĵojn, okazaĵojn ne atenditajn, kiel kosmajn eventojn, kiel memoraĵojn de la tempo, kiam li kondukis la popolon en la dezerto, fajro dum la nokto kaj kolono de nubo dum la tago.

Tiuj signoj, tiuj mirindaĵoj estas indikiloj antaŭ la alveno de la tago de la Eternulo, indikiloj por tiuj, kiuj kapablas legi ilin, kompreni ilin, tago granda kaj timinda. Granda pro tiu, kiu esperas en li, timinda por tiu, kiu ne fidas kaj kiu timas. Strange la greka versio *Septuaginta* anstataŭ timinda uzas la vorton ἐπιφανή, videbliga. Oni komprenu ke Dio intervenas, ke li intervenas en nia propra vivo, kaj ke li intervenis ĉe Kristo, kaj ke li intervenos poste.

*Kaj estos*, denove, *ĉiu*, denove, kiu vokos la nomon de la Eternulo, kiu krios al la Eternulo, sed ankaŭ kiu legos (estas la sama vorto) la nomon de la Eternulo, kiu legos ĝin ĝuste en la signoj eksteraj kaj intimaj, tiu eskapos la katastrofajn kondiĉojn, tiu saviĝos.

En tiu tempo de Joel, la minacoj efektivaj estis la akridoj, la sekeco, la najbaraj invadoj. Ĉe ni nun, la minacoj estas kaj eksteraj, la sociaj, ekonomiaj, ekologiaj, sanecaj, kaj intimaj, la psikaj, emociaj, spiritaj. Ĉu ni eskapos el tiuj minacoj ? Al kiu ni voku ? Kiun indikilon ni legu? La savloko estis la monto Cion kaj la urbo Jerusalem, sed ili ne estis vere sekuraj. Eĉ el tie oni devis eskapi. El niaj supozataj sekurecoj, ni ankaŭ devas havi la eblecon eskapi. La Eternulo promesis, asertis, proklamis, ke estos eskapintoj.

Dio proklamas, ke la savo estas ankaŭ ebla, ankoraŭ ebla. Ĉu vi pretas fuĝi la nunan katastrofan situacion personan ? Ĉu vi ne aŭdas la alvokon de Dio ? Ĉu vi pensas ke Dio ne povas legi en via vivo, ke vi saviĝu, ke vi eskapu el viaj pretendoj ?

Kiu nuntempe kapablas legi la manifestiĝon de Dio en la signojn, kiujn li donas? Kiu kapablas kompreni, ke la homoj, ĉiu homo, misadministras la medion kaj kaŭzas katastrofojn, ekologiajn, ekonomiajn, sanecajn ? Kiu serĉas, kiu pretas ricevi la elverŝitan blovon de la Eternulo ? Kiu akceptas profetadi ? Kiu kapablas sonĝi sonĝojn ? Kiu kapablas ekkompreni, ke sian vivon mem li misgvidas ?

Kiu saviĝos el tiu generacio ?

Neniu kapablas saviĝi sola, per propra forto. Neniu kapablas eskapi, krom se li aŭskultas la alvokon de Dio, krom se li eniras en la tagon de la Eternulo, grandan kaj timigan, grandan kaj sekurigan, grandan kaj videbligan.

Lian blovon, lian Spiriton, ni bezonas. Lian blovon, lian Spiriton, li promesas. Lian blovon, lian Spiriton, li donacas, li provizas, al tiuj, ĉiuj tiuj, kiuj aŭdas la alvokon, kiuj legas la signojn.

Petro, laŭ la Agoj de la Apostoloj, citas tiun ĉi tekston por indiki, ke Dio plenumas tiun promeson, tiam. Sed la promeso estas ankaŭ por ĉiuj ĝis malproksime, kiujn alvokos la Sinjoro, nia Dio. Ni akceptu tiun blovon de vivo.

Amen.

Aŭskultu la diservon ĉe: tinyurl.com/569dw7y7




## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

### 10. septembro

*Ho Patro, aktivigu min por Via servo.*
*Pro tiu servo mi servu al miaj kunhomoj.*
*Mi ne preterpasu iliajn bezonojn, suferojn*
*kaj dolorojn, sed malpezigu iliajn ŝarĝojn.*

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.

# La familia altaro

## Alportu Vian donacon al la Altaro La Ĉiam-Ĉeesta Gasto

Tradukis Nathan GANT, USONO

Malgranda knabo, proksimiĝante sian patrinon, multe interesiĝis pri enkadrigita devizo sur la muro de la manĝoĉambro en la hejmo, kie ili loĝis. Ĝi legis, "Jesuo estas la Estro de ĉi tiu Domo". Lia patrino, klarigante al li ĝian signifon ĉe la ĉeesto de ilia gastigantino, ne iomete embarasiĝis, kiam li tre akre demandis: "Kial ili ne metis lokon por li ĉe la tablo tiam?" La demando estas pli serioza ol amuza. Kvankam "Dio estas Spirito: kaj liaj adorantoj devas adori lin en spirito kaj vero" (Joh 4:24).

Li tamen estas aŭ la ĉiam-ĉeestanta gasto, aŭ ĉe la pordo frapanta, por ke Li eniru kaj fariĝu feliĉa gasto kun ni. Al tiuj, kiuj akceptis Lin en siajn hejmojn, ĉu ne estas saĝe pripensi iun videblan kaj palpeblan manieron, ke tiu fakto estu ĉiam antaŭ ni?

La okulo estas la plej efika rimedo por atingi la koron, kaj se iuj malmultaj pruvoj pri la ĉeesto de Dio videblas, ĝi emos fari Lian ĉeeston ĉiam pli reala.

### La Templo de Dio

La monaĥo Aŭgusteno de Hipono en "Homilioj pri la unua epistolo de Johano", 416 p.K. skribis: "Faru vin templo por Dio en la tempo. Ĉar la templo de Dio estas sankta, kiu templo vi estas. Ĉu vi preĝus en templo? Preĝu en vi mem. Sed estu vi unue templo de Dio. Ĉar Li en sia templo aŭdas tiun, kiu preĝas." *

Homo pensas per simboloj, kaj la centro de sia kultado estas la altaro dediĉita al Dio ... la loko antaŭ kiu li riverencas sian koron kun respekto. Se ni faros templojn de niaj korpoj por niaj adoraj bezonoj, kial ni ne konsekru niajn hejmojn kiel templojn por familia kultado? Kial ne altaro en la hejmo kiel pruvo de Lia ĉeesto en la sino de la familio?

### La Familia Biblio

Tre konkreta pruvo pri la ĉeesto de Dio en la hejmo, troviĝas en ekzemplero de Lia Sankta Vorto, la Familia Biblio. Tamen ĝi estas pruvo de Lia ĉeesto tute laŭ la maniero kiel ĝi estas respektata. Ĉi tiu Bona Libro estas bone nomata Sankta. Ĝi estu traktata kun respekto kaj amo, por ke viaj infanoj de siaj plej fruaj memoroj sciu, ke vi tiel konsideras ĝin. Kial ne doni al ĝi taŭgan lokon en via hejmo, propran lokon pro tio, kion ĝi povas kaj devas signifi? Kial ne fari ĝin la centro de via Familia Altaro?

### Planu Familian Altaron en Via Hejmo

Trovu lokon en via hejmo, konvenan al, ankoraŭ ne nepre en la centro mem de via

* Noto: alia monaĥo nomata Aŭgusteno, kiu alportis la Biblion kaj Kristanismon al Anglio antaŭ pli ol 1300 jaroj.

viva spaco, kaj dediĉu ĝin al Dio. Vi konservas, eble, ĉambron por la foja gasto. Ĉu eĉ ne malgranda spaco en via hejmo povas esti sanktigita al via Konstanta Gasto? Ĝi ne bezonas esti granda; ĝi ne bezonas esti ornamita. Ĝi bezonas nur esti la loko de Dio. Konservu Lian Sanktan Vorton tie. Kelkaj taŭgaj bildoj proksime helpos distingi ĝin.

Vazo, kun floroj, kiam ili troveblas, por ke la ĉambro lumiĝu. Ĉirkaŭu ĝin per sankteco.

Faru sanktan lokon al Li en via domo kaj en via koro. Proksime de ĝi la familio povas kolektiĝi por adori. En tempoj de individua dubo aŭ mizero, kie vi eble sentas vin speciale proksima al Dio, petante konsolon, forton kaj gvidon. Kiam Li montros Siajn bonfarojn, ĝi formos la idealan lokon por danki. Ĝi povas esti ĉiama certigo pri Lia proksimeco.



## Uzoj de la Familia Altaro

Viaj propraj cirkonstancoj devas gvidi vin al ĝia aranĝo, memorante ĝian celon, kaj kion ĝi povas plenumi en via hejmo. Ĝi povas dolĉigi kaj riĉigi vian familian vivon, kaj la vivojn de ĉiuj en la hejma rondo, instruante respekton al sanktaj aferoj. Estos konstanta memorigo, ke temas pri kristana hejmo. En ĝia ĉeesto ni povas pli bone aliri la malfacilaĵojn kaj frotojn, kiuj eniras la hejmon; kaj eliru de hejmo tiel gracita kun pli granda fido. Ĝi permesos la amikecon de la gastoj en nia hejmo kaj estos instigo al aliaj krei lokon por la Savanto en iliaj vivoj kaj koroj.

## Familia Diservo

Dio zorgis pri tio, ke la hejmo estas la koro kaj kerno de la socio. La homaro pliboniĝas nur kiam la hejmoj, en kiuj homoj kreskas kaj maturigas, pliboniĝas.

Kiam la hejma vivo kadukiĝas, la fundamentoj mem de la socio estas minacataj. Kiun familion vi konas, kiu ne povus profiti de pli spirita potenco? Tia potenco devenas tre certe de la Vorto de Dio, kaj ĝia plibonigita uzo en via hejmo signifas, ke Kristo estos alta kaj fariĝos, ne nur unua en la hejmo, sed ankaŭ unua kaj lasta en la vivo ekster ĝiaj limoj.

Adori en via hejmo, en kiu ĉiuj havas parton, povas plenumi multajn postulemajn aferojn. Neniel oni povas pli bone instrui la infanojn, kiam la religiaj konvinkoj de la gepatroj estas tute sinceraj. Tia regula kultado, kiel parto de la komuna vivo de la hejmo, igas preĝon kaj legadon de kaj ofta uzo de la Biblio tiel naturaj kaj necesaj kiel manĝo kaj ripozo. Ĝi provizas komunan fonton de kuraĝo, komforto kaj gvidado, punkto de kunveno, ĉe kiu niaj diferencoj pli bone prilaboreblas, kaj donas direkton, celon kaj tonon al la vivo.

## Ĉu Vi Jam Havas Familian Kultadon?

La kialoj, kial pli multaj familioj ne havas regulan kultadon en la hejmo, estas multaj, sed ili senescepte kuŝas al unu kaŭzo, *timo*. Ni timas tion, kion amikoj kaj najbaroj povas diri. Aŭ timas, ke nia propra kontribuo estu sub tio, kio ŝajnas bezonata. Timante, ke la infanoj enuos. Iuj el ni eĉ timas doni nin al Dio en ĉeesto de aliaj. Kiam tia timo ĉeestas, eble estus bone revidi kaj vidi kiom profunda kaj sincera estas nia profesio esti kristano. – Esti praktikanta kristano ofte bezonas kuraĝon. Kio bezoniĝas por Diservo? Tri aferoj bezoniĝas – tempo, volemo kaj sincera partopreno.

Pri tempo, ĝi devas esti regula kaj neŝanĝebla.

Pri daŭro, ĝi ne bezonas esti longa, kaj ĝia elekto varias laŭ familiaj cirkonstancoj. Ĝi estu tia, kiam ĉiuj membroj povas ĉeesti. Kvin aŭ dek minutoj ĉiutage, estas pli bona ol pli longa periodo kun malpli da ofteco. Multaj familioj solvas ĉi tiun elekton de tempo plilongigante la periodon, en kiu oni kutime diras gracon komence de la tagmezo aŭ vespera manĝo. Ĝi estu tiel aranĝita kaj ellaborita, ke ĉiuj havu instigon partopreni, kaj ĉiuj kontribuu havante tiajn, kiajn ili kapablas preni. Nuanco de neformaleco, ene de la spirito de respekto, estas pli bona ol nura rutino. Estas neceso de sincereco – ke oni donas sian plej bonan, kaj tion kuraĝigu la sintenoj de la gepatroj kaj la infanoj. Faru ĉion eblan por ĝojigi ĉi tiujn tempojn. Unu el la plej impresaj manieroj krei spiriton de unueco en la familia rondo estas, ke ĉiuj kunigu manojn pri la tablo, kiam oni diras gracon, aŭ oferante preĝon unisone, prefere la Sinjoran Preĝon. Ĉi tiu lasta estas ideala maniero fermi viajn sindediĉojn. Kompreneble estu legado de la Biblio. Ofte la legado de la versoj de himno, kiu havas apartan rilaton al iu speciala okazo, estas sufiĉe taŭga. Se via kuraĝo permesos, kantu la himnon kaj kantu unu regule, anstataŭ legi ĝin.

Tradukita el la kristana Biblio,
"FAMILIA ALTARA Eldono"
(King James Version), ĉ. 1944, 1949.
La Nacia Biblia Gazetaro, Filadelfio, PA.

Ekzemplo de familia altaro / Vikipedio



# La strato de dolaro – “Dollar Street“

www.gapminder.org/dollar-street

Kompilis kaj tradukis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Imagu la mondon kiel straton ordigitan laŭ enspezoj. Ĉiuj loĝas ie laŭlonge la straton. La plej malriĉaj vivas maldekstre kaj la plej riĉaj dekstre. Ĉiuj aliaj loĝas ie inter tiuj polusoj. Dollar Street estis inventita de Anna Rosling Rönnlund ĉe Gapminder. Dum 15 jaroj ŝi pasigis siajn labortagojn faciligante komprenon kaj uzadon de tutmondaj publikaj datumoj.


Kun la paso de tempo ŝia frustriĝo kreskis: zorge elektante datumojn por prezenti ilin en buntaj kaj kortuŝaj leteroj faciligis la komprenon de ĝeneralaj tutmondaj tendencoj kaj rilatojn. Sed ĝi ne komprenigis ĉiutagan vivon de malsamaj enspezaj niveloj. Precipe ne en lokoj malproksimaj de onia hejmo. *“Homoj en aliaj kulturoj ofte estas prezentataj kiel timigaj aŭ ekzotaj.”* Anna klarigas: *“Ĉi tio devas ŝanĝiĝi. Ni volas montri kiel homoj vere vivas. Ŝajnis nature uzi fotojn kiel datumojn por ke homoj mem povu vidi kiel aspektas la vivo sur malsamaj enspezaj niveloj. Dollar Street permesas al vi viziti multajn hejmojn tra la tuta mondo. Sen vojaĝi.”*

Teamo de fotistoj ĝis nun dokumentis pli ol 264 hejmojn en 50 landoj. En ĉiu hejmo la fotisto pasigas tagon fotante ĝis 135 objektojn, ekzemple dentobrosojn de la familio aŭ ŝatatajn ŝuojn. Ĉiuj fotoj estas etikeditaj (hejma funkcio, familia nomo kaj enspezo).

Dollar Street estas disvolvita de Gapminder, kiu estas sendependa sveda fondaĵo sen politikaj, religiaj aŭ ekonomiaj alligitecoj. La fondaĵo batalas kontraŭ detruigajn miskomprenojn pri tutmonda evoluo per sia faktobazita mondkoncepto, kiun ĉiuj povas kompreni.

La fondaĵo produktas senpagajn instruajn rimedojn bazitajn sur fidindaj statistikoj, kaj kunlaboras kun universitatoj, UN-organizaĵoj, publikaj agentejoj kaj neregistaraj organizaĵoj.

Bonvenon viziti ĉiujn hejmojn laŭlonge Dollar Street! Per la permesilo 4.0 de Creative Commons, vi rajtas reuzi, redakti kaj dividi la bildojn de Dollar Street. Ni esperas, ke vi ĝuos ĝin! ☙




# Informetoj


## De kie venas kvadrataj fiŝoj?

Karaj gefratoj, antaŭ mia enkarceriĝo, mi nek sciis, kiom Dio amas min, nek ke li volas, ke mi uzu miajn talentojn bonmaniere.

Post tiu vekiĝo, mi enverkadis poemojn. Ĉiuj diradis, ke estas bonege. Mi eĉ verkadas multajn poemojn, kiuj emas sekvi la stilon de fama infanlibroverkisto D-ro Seuss. Laŭ sugesto, mi dungis artiston, kiu ilustris la verkojn. Do estas preta la angla kaj la esperanta versioj de De kie venas kvadrataj fiŝoj? Multaj homoj jam promesis publikigi tiujn senkoste per Amazon kaj dividi la profitojn kun mi, sed post pli ol 3 jaroj, ankoraŭ ne plenumiĝis. Do, mi demandas al la fratoj, ĉu vi aŭ fidinda konatulo volus kaj povus fari tion, per kiu ajn publikmaniero. (Mi jam havas alian porgejunulan anglan libron de absurdaj rimoj preta, kaj 10 aliaj infanpoemoj jam verkitaj, kiuj povus iĝi infanlibroj ankaŭ.) Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti min ĉe:

Mark Hamme
#33391-379/USP/P.O Box 24550/
Tucson, AZ 85437 USA.





# Retaj diservoj kaj Bibliaj tagoj en Esperanto

## – ĝisdatigita listo




Bildoj el la retaj diservoj



Familio Dalitz (23. majo 2021)

Pro la granda kaj laŭdinda laboro de Wolfram Rohloff kaj liaj pluraj diverslandaj kunlaborantoj, dum la pandemio diservoj kaj Bibliaj tagoj estis dissenditaj pere de Jutubo [Youtube].

Se vi volas spekti/aŭskulti ilin, vi trovos ilin je la jenaj retaj adresoj‡:

29. mar 2020: https://tinyurl.com/yy6gskd4
25. apr 2020: https://tinyurl.com/y6m5ysce
30. maj 2020: https://tinyurl.com/yyqgfhlo
8. aŭg 2020: https://tinyurl.com/y2nbtk3x
4. okt 2020: https://tinyurl.com/y5qfhklg
29. nov 2020: https://tinyurl.com/y64z2w7j
25. dec 2020: https://tinyurl.com/y3xuq4ra
4. apr 2021: https://tinyurl.com/rr9avbrd
23. maj 2021: https://tinyurl.com/569dw7y7

Reformacia tago – biblia leciono
31. okt 2020: https://tinyurl.com/yxjwkm5m

Retaj Bibliaj tagoj 2021:
Enkonduko: https://tiny.one/2t5bs79z
26. feb 2021: https://tiny.one/jknk2uns
27. feb 2021: https://tiny.one/rkp2mhpz
28. feb 2021: https://tiny.one/4twb5pnz



Wolfram Rohloff

Eblas trovi la esperantajn dissendojn (inter aliaj) ĉe: https://tinyurl.com/94pf93d8


‡ Tiuj-ĉi adres-ligoj estas mallongigitaj por pli facile povu retajpi ilin. Ili ne similas, se vi havas ligojn de aliloke, sed same funkcias. /red

**Aliĝu al la gruplisto *keli-dia-regno+subscribe@googlegroups.com* por ricevi informon! Philippe Cousson estas administranto de la gruplisto. Anoncu vin!**


# Esperant', Ernesto, estas via ĝojo

Akrostiko por Ernst Leuze
(* 1935-07-18)

okaze de lia 86a
naskiĝ-jubileo



Ernst Leuze
Wühlestraße 11
73235 Weilheim
www.ernstleuze.de




ESPERANT', ERNESTO, ESTAS VIA ĜOJO • M kaj E (originale verkita kiel akrostiko): Albrecht Kronenberger 2021-07-17

# Somere gajiĝas la vasta land'

## Dorsflanka kanto kaj Pli ol kvindek

Adolf BURKHARDT: *PLI OL KVINDEK* aperis kiel kajero 1998 ĉe Bernhard EICHKORN.

Jam unu jaron antaŭe la tekstoj 1 ĝis 52 (do ne jam la kanto dorsflanke) estis publikigitaj sur la kompaktdisko "espeRom" de Germana Esperanto-Asocio, n-roj 1–51 sub la titolo *Pli ol duon-cento* (espeRom > LEGI > BURK > KOLEKT), kaj la numero 52 aparte (espeRom > LEGI > BURK > ZAUBER).

Interrete la kajero estas dokumentita en la «Himnaro Cigneta» de ROS' Haruo, sed ĝis nun (2021-06-30) ne komplete. Jen kelkaj adresoj de ties paĝoj:

| | |
|---|---|
| Ĉefpaĝo: | http://www.geocities.ws/cigneto/thcind/himnaro.html |
| Adolf Burkhardt: | http://www.geocities.ws/cigneto/thcbio/b/burkhardt_a.html |
| Pli ol 50: | http://www.geocities.ws/cigneto/flanke/pliol50/kovrilo1.html |
| la dorsflanka kanto: | http://www.geocities.ws/cigneto/flanke/pliol50/53.html |

La interreta portalo KRISTANAJ FONTOJ disponigas la tekstojn (laŭeble kun aldono de la nacilingvaj originaloj) al siaj – ensalutintaj – geamikoj: http://fontoj.net > Trezorejo aŭ: http://fontoj.net > kanti

## Germana kaj sveda tekstoj de la dorsflanka kanto

germane:

1. Im Sommer erfreut sich das weite Land
vom Berge bis hin zu den Schären,
wir rudern, wir segeln, wir reiten am Strand,
der Sommerwind weht durch die Ähren.
Die Freude und Stärke Gottes mit uns,
die Freude und Stärke Gottes mit uns,
mit allen den Leuten im Lande.

2. Wir hören die Vögel singen im Hain,
die Tiere eilen zur Tränke.
Wir hören am Strande die Möwen schrein,
sie flattern über die Bänke.
Die Freude und Stärke Gottes mit uns,
die Freude und Stärke Gottes mit uns,
mit allen den Leuten im Lande.

Karl Seidelmann

sveda refreno:

Gud glädje och styrke de
män, som där bo,
Gud glädje och styrke de
män, som där bo,
Vid älvom, på berg och i
dalom.


A. E. Wallenius (1615-1663)

La 16 svedaj strofoj kantas pri diversaj paroĥoj laŭlonge la Rivero Dalekarla (Dalälven) en Dalekarlio (Dalarna).

# Somere gajiĝas la vasta land'

OM SOMMAREN SKÖNA, NÄR MARKEN HON GLÄDS

IM SOMMER ERFREUT SICH DAS WEITE LAND




2. Arbare aŭdiĝas de l' birdoj la kant',
trinkejen rapidas la brutoj.
  Aŭdiĝas la krio de l' mevoj ĉe l' strand',
  flirtantaj sur sabloj kaj krutoj.

La ĝojo kaj forto …

Germana kaj sveda tekstoj sur paĝo 95

OM SOMMAREN SKÖNA, NÄR MARKEN HON GLÄDS • IM SOMMER ERFREUT SICH DAS WEITE LAND • sveda popolkanto el Dalekarlio • germana T: Karl Seidelmann (1899-1979) • © Copyright control • E (el la germana): Adolf Burkhardt 1995 • 1998 en «Pli ol kvindek» 53